



Bulteno

de Esperantista Klubo en Prago

Ĉasopis Klubu esperantistů v Praze

N-ro 3/2020 (220)

9. 11. 2020

Armena semajno en Prago Հայկական շաբաթ



Ekde la 12-a ĝis la 18-a de oktobro 2020 okazis en nia klubo interreta seminario *Armena semajno* kiel signo de solidareco kun Armenio kaj Arcaĥo trafitaj de kruelega milito. Dum tiu aranĝo oni studis diversajn materialojn pri Armenio kaj ĝia kulturo kaj pri tiea Esperanto-movado. Inter armenaj gesamideanoj ni akiris novajn geamikojn.

EL LA ENHAVO

Historio de armena Esperanto-movado	3
Armenio kaj ĝia kulturo (A. Elbakjan)	4
2800 jaroj de Erevano (A. Elbakjan).....	7
Armena alfabeto	15
Spuroj de Armenio en Prago	16
La Fabelo de la lasta Penso (E. Hilsenrath)	17

O ĉasopisu

Evidenční číslo: MK ČR E22980
Vydavatel: Klub esperantistů v Praze
Sídlo: Jirečkova 5, Praha 7
Vychází třikrát ročně
Kontakt: t.brighacek@seznam.cz
Redaktor: Tomáš Břicháček
Korektury: Pavol Petřík

Antaŭparolo de la redaktoro / Խմբագրական

Tomáš Břicháček

En tiuj ĉi tagoj niaj pensoj estas ofte kun Armenio kaj Montara Karabaĥo. Dum nia situacio kun la koronaviruso ŝajnas bedaŭrinda, ni ne forgesu, ke en iuj partoj de la mondo homoj havas multe pli gravajn problemojn kaj eĉ batalas por sia propra ekzistado kaj ŝtateco!

Komence de la nuna milito mi salutis la armenajn samideanojn kaj esprimis niajn viglajn simpatiojn al ilia popolo. Ĉeĥoj ĉiam estis amikoj de tiu antikva kristana nacio, kiu vivas en nefacilaj politik-geografiaj kondiĉoj.

Kiam mi tiurilate konatiĝis kun la aktiva armena Esperanto-movado kaj kun armena kulturo, ekestis ideo organizi retan seminarion *Armena semajno* kaj antaŭ ĉio prepari unu numeron de Bulteno tute dediĉita al Armenio. Koran dankon al ĉiuj, kiuj helpis al mi efektiviĝi tiujn du intencojn.

Ni forsendas el Prago al niaj armenaj geamikoj dezirojn de ĉio plej bona kaj ĉefe de rapida reveno de paco en ilian landon.

Այս օրերուն մեր մտքերը յաճախ կ'այցելեն Հայաստանն ու ի մասնաւորի Լեռնային Ղարապաղը: Որչափ ալ կնճռոտ ըլլայ թագաժահրին ստեղծած կացութիւնը, պէտք չէ մոռնանք, որ աշխարհի ուրիշ վայրերուն մէջ մարդիկ առաւել ծանրակշիռ խնդիրներ կը դիմագրաւեն եւ ստիպուած են անգամ իրենց գոյութեան եւ երկրին ապահովութեան համար պայքարելու:


Ներկայ պատերազմի առաջին օրերուն իսկ ողջունեցի հայ ընկերներն եւ մեր խորին համակրանքները յայտնեցի իրենց ժողովուրդին: Չեխերս միշտ ալ բարեկամ եղած ենք քրիստոնեայ հինաւուրց այդ ազգին, որ կ'ապրի քաղաքական եւ աշխարհագրական դժնդակ պայմաններուն տակ:

Երբ ես այս առթիւ տեղեկութիւններ ժողվեցի էսփերանոյի հայկական գործօն շարժման ու հայ մշակույթին մասին, գաղափարը ծագեցաւ կազմակերպելու առցանց հանդիպում մը եւ հայկական շարաթ մը, ինչպէս նաեւ պատրաստելու մեր միութեան Տեղեկաթերթիկին բացառիկ թիւ մը՝ ամբողջութեամբ նուիրուած Հայաստանին: Սրտանց շնորհակալութիւնս կը յայտնեմ բոլորին, որոնք օգնեցին ինձի այս մտադրութիւններս իրագործելու:

Փրակէն ջերմագին բարեմաղթանքները կը յղենք մեր հայ բարեկամներուն, ամենէն առաջ մաղթելով որ խաղաղութիւնը անյապաղ վերահաստատուի իրենց երկրին մէջ:

Historio de armena Esperanto-movado

Armenaj esperantistoj disvolvis sian agadon en la komenco de la 20-a jarcento en urbo Tiflis (nuntempe Tbiliso, la ĉefurbo de Kartvelio). Februare 1905 estis organizita la unua E-grupeto, iom poste aperis la societo de kaŭkazaj esperantistoj, kies organizantoj kaj inspirantoj estis reprezentantoj de armena popolo



Abeljan, Oĥanĝanjan, Asatrjan, Ter-Astvacatrjan, Sirunjan k. a.

Dum tiu tempo estis organizitaj kursoj de Esperanto, estis eldonita vortareto, lernolibroj. En la jaro 1910 aperis la literatura revuo „Kaŭkaza Esperantisto“ esperantlingve, armene, ruse kaj kartvele. Estis surscenigitaj E-spektakloj, kiuj havis grandan sukceson.

En la jaro 1923 la sekretario de la Unio de kaŭkazaj esperantistoj, tiam juna Gurĝen Sevak (la estonta lingvisto kaj Akademiano; vidu la foton supre) alveturis Armenion kaj fondis en Erevano Esperanto-ĉelon.

En la 30-aj jaroj Esperanto en Armenio travivis sian „Oran Epokon“, kiu daŭris ĝis la Dua mondmilito. Post la mondmilito la movado komencis revigliĝi. Dank’ al profesoro Gurĝen Sevak en Erevana Ŝtata universitato estis fondita Armenia Esperantista organiza Komitato. En la jaro 1958 sub aŭspicio de la universitato estis eldonita monata literatur-kultura lerna bulteno “Armena Esperantisto“ (ĉefa redaktoro – profesoro G. Sevak; sekretario – Abel Simonjan).

En la jaro 1965 ĉe la Armenia filio de Sovetunia societo de amikeco estis malfermita E-komisiono sub gvido de G. Sevak.

En la jaro 1973 funkciis E-kursoj kaj estis fondita E-klubo ĉe la Armenia societo de amikeco kaj kulturaj ligoj.

Ekde tiu tempo komenciĝis nova epoko en Armenia E-movado, funkciis kelkaj E-kursoj kaj estis organizitaj multe da aranĝoj. En la jaro 1979 estis fondita Armenia filio de ASE (Asocio de sovetaj esperantistoj). La 20-an de februaro 1991 la organizaĵo oficiale registriĝis kiel memstara Armenia Esperantista-Asocio (AEA). Ekde la jaro 1997 AEA iĝis membro de Universala Esperanto-Asocio. La 11-an de aŭgusto 2010 AEA renomiĝis kiel Armenia Esperantista Unuiĝo (AEU).

laŭ <https://aresun.weebly.com/>

Armenio kaj ĝia kulturo

Araksja-Inna Elbakjan

Armenio – armene Հայաստան [hajastán], oficiale Armena Respubliko – estas ŝtato, kiu originas el unu el la plej antikvaj civilizoj de la mondo. Donacata de riĉa kulturheredaĵo, ĝi elstaris la unua en la adoptado de la kristanismo kiel oficiala religio en la jaro 301. Ĝi situas en la suda Kaŭkazio, la arbitra landlimo estas inter Eŭropo kaj Azio. Ĝi kundividas landlimojn okcidente kun Turkio, norde kun Kartvelio, oriente kun Azerbajĝano kaj Irano, kaj sude kun la azerbajĝana enklavo Naĥiĉevano.

Armenio estas montara lando, kiu estis loĝata ekde prahistoriaj epokoj. La arkeologoj daŭre trovas restaĵojn, kiuj demonstras, ke Armenio estis inter la unuaj lokoj, kie la homa civilizo ekloĝis. Ekde 4000 a. K. ĝis 1000 a. K. la iloj kaj ornamaĵoj el kupro, bronzo kaj fero estis ellaborataj en Armenio kaj ofte vendataj en najbaraj regionoj, kie tiuj materialoj estis malabundaj.

Unu el tre interesaj vidindaj arkeologiaj trovaĵejoj estas kaverno Areni. La kaverno situas proksime al la vilaĝo kun la sama nomo – Areni, kaj la distanco al la ĉefurbo de Armenio – Erevano – estas nur 110 km. Ĝi estas karsta kaverno, situanta je alteco de 1080 m super marnivelo, ĝuste super la bordo de la malgranda rivero Arpa. La enirejo al kaverno Areni estas kalkŝtona mallarĝa fendo. Ĝi konsistas el tri haloj, havantaj inter si multajn naturajn koridorojn. La tuta areo de la kaverno estas pli ol 400 m².

En la kaverno estis multaj birdaj nestoj, dank’ al kio estis fiksita ĝia alternativa nomo – *Birda*. Apude estas restoracio, kies posedanto decidis vastigi ĝin per eksplodoj, aranĝante novan ĉambron por restoracio. Tamen, baldaŭ la posedanto de la restoracio mortis. Lokuloj diras, ke la eksplodojn en kaverno ne ŝatis la kavernaj spiritoj, kaj ili portis lian animon en profundon de la monto.

Dum jarcentoj kavernoj de la vilaĝo Areni estis konsiderataj kiel ordinaraj kavernoj en la rokoj – lokaj infanoj kaŝludis tie, kaj neniu sciis ilian sekreton. Sed en la jaro 2007 ĉi tie komenciĝis arkeologiaj elfosadoj, kiuj radikale ŝanĝis la percepton de la historio.

En la kaverno Areni estas speciala atmosfero. Ne ekzistas humideco, do organikaj materialoj ne putras.

Armeniaj arkeologoj malkovris unikan eltrovaĵon – la tombolokojn de perfekte konservitaj homaj korpoj (plenkreskuloj kaj infanoj) de la eneolita epoko. En la malantaŭa parto de la kaverno estis malkovrita ejo kun ujoj por nutraĵo, produktado kaj stokado, kaj ankaŭ enfositaj kranioj. Dank’ al esplorado estis malkovrite, ke la kranioj apartenas al tri 13–14-jaraj knabinoj, kaj ilia reala aĝo estas pli ol 5,9–6,2 mil jaroj. En unu el kranioj oni trovis restaĵojn de cerbo, kun la sangotubetoj, konservitaj sur surfaco de la cerbo. La trovaĵo estas la plej antikva el iam ajn trovitaj restaĵoj de

antikva homo kaj provizas unikan eblon determini la tutan genetikan kodon de infano, uzante DNA-analizon, ĉar ĝi donos multajn novajn kaj unikajn informojn pri homa genetika evoluo.

En la tuta vario de trovoj de la Areni-kaverno, specialan lokon inter ili okupas la leda ŝuo, kiu fariĝis la karakteriza stampo de ĉi tiu arkeologia monumento, kaj hodiaŭ estas montrata en Erevano, en la Nacia Muzeo de Armenio. Ĝi estis malkovrita en 2008. La ŝuo kuŝis ĉe la fundo de prilaborita fosaĵo kun 44–48 cm diametro en profundeco de 45 cm sub rompita ceramika bovlo, kovrita per densa tavolo de ŝafa ekskremento de supre, kiu sigelis ĝin kaj certigis sekurecon. La ŝuo estis plenigita per pajlo kaj herbo por havi formon. Analizinte la haŭton, oni konstatis, ke la aĝo de leda ŝuo de la Areni-kaverno estas ĉirkaŭ 5,5 mil jaroj, kio igas ĝin la plej malnova leda ŝuo iam trovita de arkeologoj. Ĝia unikeco estas ne nur la aĝo, sed ankaŭ tio, ke ĝi estis farita el prilaborita tuta leda peco. Ĝi havas longecon de 24,5 kaj larĝecon de 7,6–10 cm. Plejverŝajne ĝi estis portita por la dekstra piedo. Sur ĝi konserviĝis ŝnuro kun truetoj kun diametro de 2–3 mm. La maldekstra ŝuo ne estas trovita.

Por determini la aĝon de la artefakto, specimenoj de haŭto kaj pajlo estis senditaj por sendependa ekzameno al la institutoj de Kalifornio kaj Oksfordo. La rezulto de ilia analizo kun precizeco ĝis 95,4% montras aĝon de 5,5 mil jaroj kaj apartenas al la tempa intervalo de 3627 ĝis 3377 a. K., kio signifas, ke la ŝuo estis farita je 400 jarojn pli frue ol Stonehenge kaj preskaŭ je mil jarojn pli frue ol la piramidoj de Giza en Egiptio.

Dank' al speciala mikroklimato en la kaverno ankaŭ estis trovitaj grandaj kruĉoj kun restaĵoj de vinberaj ŝeloj kaj kernoj, semoj de pli ol 30 specoj de fruktoj, multaj cerealoj, kano kaj sekigitaj prunoj. Kernoj de vinberoj, vitoj, kune kun ilaro por produktado kaj stokado de vino povas indiki, ke tiu ĉi regiono estis unu el la plej malnovaj kompleksoj por la industria produktado de vino. Spuroj de vinfarejo en la kaverno apartenas al la Eneolitiko.

Ne malpli meritas vian atenton la antikva, aŭ paleoflaŭro de Armenio, pri kiu okupiĝas miaj kolegoj en Instituto de botaniko.

Armenio situas malproksime de grandaj maraj basenoj, posedas falditan reliefon, estas teritorio de alta sismo kun akra variado de altecoj: de 450 ĝis 4095 m super marnivelo – ĉiuj ĉi tiuj faktoroj kontribuas al eksterordinara komplekseco kaj diverseco de tereno kaj klimato, kaj kiel konsekvenco de la flaŭro – ĉi tie kreskas 3500 specioj de altrangaj plantoj. Tio signifas, ke en nia malgranda lando kreskas pli ol duono de la specifa konsisto de la flaŭro de tuta Kaŭkazo.

Dank' al ĉio ĉi – al nia historio, naturo, klimato, scienco formiĝis nia karaktero, nia kulturo, kiu estas ne malpli riĉa ol nia flaŭro.

Armenio estas ŝtona lando. Laŭ legendo, kiam Dio disdonis la terojn, li kribris ĝis per kribrilo kaj ŝtonojn ŝutis apud siajn piedojn. Ĝuste tie estas Armenio. El ŝtonoj estas konstruitaj la belegaj temploj, preĝejoj kaj la pontoj kaj ni eĉ havas t. n. ŝtonan simfonion, aŭ ŝtonan orgenon.

Nia kulturo estas ankaŭ la ĥaĉkaroj – kruĉŝtonoj. Ĥaĉkaro (laŭvorte „kruco–ŝtono“) estas speco de armeniaj arkitekturaj monumentoj, prezentitaj kiel ŝtona steleo. Ĥaĉkaroj plej ofte estas rektangulaj ŝtonoj, sur kiuj estas skulptita kruco, sube – la rozet-svastiko – la simbolo de eterneco, nomata areva ĥaĉ (suna kruco) – antikva armena simbolo kun turnoblova, ŝraŭboforma rondo, simila al la suno. Kune kun la kruco povas esti sanktuloj, scenoj el la Sanktaj Skriboj, reĝoj, soldatoj, kamparanoj.

Ĥaĉkaroj kovras tutan Armenion. Oni povas renkonti ilin ne nur apud aŭ sur monaĥejoj muroj, sed ankaŭ en montoj, laŭ vojoj. Ofte ĥaĉkaroj estas fragmentoj de la muroj de preĝejoj kaj kapeloj, severaj kaj simplaj. Kiam vi venas al Armenio, en la dua aŭ tria tago de via restado la ĥaĉkaroj ŝajnas kiel naturo, same kiel la ĉielo aŭ seka herbo apud la ŝoseoj.

La plej malnova datita ĥaĉkaro en Armenio datiĝas al la jaro 879.

En la 12-a jarcento naskiĝas nova epoko de ĥaĉkaroj. Armitaj kun la sperto de prapatroj, la kreintoj atingas la plej altan gradon de ŝtona arto, spite al malfacilaĵoj de ĉi tiu verko. Ne havante eĉ la normalan liniilon, krajonon aŭ bone akritajn ilojn, en malkomfortaj mezepokaj kondiĉoj, arkitektoj komencis krei mirindaĵojn. Ili posedis superhoman paciencon, ĉar eĉ la plej malgranda eraro, iom senzorga movo de mano povus damaĝi la kruco-ŝtonon, kiu estis kreita dum kelkaj jaroj.

La mastroj laboris dum kelkaj horoj senĉese, superstreĉite, sendistrita eĉ por sekundo de la ŝtono kaj ĉizilo. La plej malfacila estis bati forte, sed atente. Aparte turmentiga estis juvela parto en fino de laboro. Ju pli atente vi rigardu deproksime, des pli delikatajn ornamaĵojn vi povas vidi.

Greka erudiciulo Mitsos Alexandroupolis miris: „Ili prenas grandan ŝtonon kaj igas ĝin punktoj, tapiŝo, ĝardeno, kanto.“ Tiaj ĝardenoj kaj kantoj en Armenio estas multaj, probable dekoj de miloj, kaj ĉiu estas unika ĥaĉkaro. Ne ekzistas du identaj ĥaĉkaroj.

En novembro 2010 la arto de kreado de ĥaĉkaroj estas enlistigita en reprezentanta listo de la UNESKO kiel „netuŝebla kultura heredaĵo de homaro“ kun formulado „Simbolismo kaj manfaritaĵo de ĥaĉkaroj, armenaj kruco-ŝtonoj“.

Nia kulturo estas nia muziko – ekde ĥazoj – muziknotoj uzitaj en la 7-a jarcento, ĝis komponistoj Komitas kaj Aram Ĥaĉaturjan, nia Ĝivan Gasparyan kun armena muzikilo duduk.

Nia kulturo estas nia arto – ekde surrokaj pentraĵoj ĝis niaj artistoj Sarjan kaj Ajvazovski, kaj multaj multaj aliaj.

Nia kulturo estas nia arkitekturo – nia arkitekto Tamanjan, kiu aranĝis planon de Erevano.

Nia kulturo estas niaj skriboj – ekde kojnskribo ĝis la alfabeto, kreita en la jaroj 405–406 de Mesrop Maŝtoc.

Nia kulturo estas Matenadaran, kie estas konservitaj miloj da antikvaj manuskriptoj pri diversaj sciencoj – fiziko, matematiko, astronomio, teologio. En miniaturoj estas uzitaj naturaj farboj – el diversaj ŝtonoj, kaj ankaŭ el ruĝa vermo – koĉenilo. Oraj platetoj estis algluitaj per ajlo – unue kiel bona gluo, kaj due – ĝi protektis manuskriptojn de insektoj.

Kaj kiel muta atestanto – la monto Ararat, kien surnavigis Noa kun sia arkeo.

Kaj jen la unua frazo, kiu estis skribita per armenaj literoj: „*Ծախաւելի զիւսստորոյուն և զիւրստ իւսնաւ զբաւսս հաւնճարոյ*” – *Por scii saĝon kaj moralinstruon kaj kompreni parolojn de prudento.*

2800 jaroj de Erevano – la urbo, kiu postvivis falitan Trojon kaj la detruon de Kartago

Araksja–Inna Elbakjan

Երևան

Unu el la plej antikvaj urboj de la mondo, samaĝulo de Babelono, Erevano estas eĉ iomete pli aĝa ol Romo. Ĝia fondiĝo datiĝas de la Urartua epoko en la jaro 782 a. K. Lokita sur la komercaj vojoj inter Oriento kaj Okcidento, Erevano suferis invadojn de skitoj, medoj, persoj, romianoj, grekoj, araboj, selĝukoj, mongoloj kaj turkoj. Armenio estis devigita ŝanĝi pli ol dekduon de ĉefurboj, kaj iam ĝi nomiĝis: „La Lando de Nomadaj aŭ migrantaj ĉefurboj“.

Laŭ legendo, la prapatro Noa, ekvidinte Monton Ararat la unuan fojon post la tutmonda diluvo, ĝoje ekkriis: „Erevac!“ – kio en armena lingvo signifas „aperitas“. Do la unua parto de la mondotero ricevis la nomon Erevan.

La ĉefa simbolo de Erevano, evidente, estas monto Ararato, videbla dum mildaj tagoj de iu ajn punkto de la urbo. Ĝi estas reprezentata en la urboŝildo. Tamen, la monto Ararato ne plu apartenas al Armenio, sed al Turkio pro militoj de la pasinta jarcento, kiam ĝi perdis tiun teritorion hodiaŭ nomatan historia teritorio de Armenio.

Tamen la origino de la urbonomo venas de la fortikaĵo Erebuno (de la Reĝlando Urarto), nuntempe restas nur ruinoj. En tiu epoko ĝi estis unu el la ĉefaj urartaj urboj.

En la jaro 1879 dum elfoslaboroj estis trovita la ŝtono, kie en 782 a. K. iu urartua beletristo sur la supro de Arin-berd monteto faris „skribaĵon“ per martelo kaj ĉizilo: „Mi, Argiŝti, la filo de Menua, konstruis ĉi tiun fortikaĵon, nomis ĝin Erebuni, por la potenco de la lando Biajnili kaj por

timigi kaj pacigi la malamikajn landojn“. La tero estis dezerta, mi multon faris – 6600 militistojn de la landoj Hate kaj Tsupani mi loĝigis tie. Nun ni, erevananoj, nomas tiun-ĉi ŝtonon „pasporto de Erevano”.

La disvolviĝo de la urbo intensiĝas dum Mezepoko (ĉ. la 5-a kaj 6-a jarcentoj), kaj la unua erevana preĝejo, Preĝejo de sanktaj Petro kaj Paŭlo, estas baptata en la 5-a jarcento.

Dum sia multjarcenta historio Erevano travivis diversajn periodojn de la ekzisto – prosperon kaj la plagojn, kvietan periodon kaj la multnombrajn invadojn. Nur dum la periodo de la turkaj-persaj militoj inter 1513 kaj 1737 Erevan trairis de mano al mano 14 fojojn. En 1603 la persio Ŝah Abbas preskaŭ tute malplenigis la urbon, dekmiloj da armenoj (inkluzive de la erevananoj) estis deportitaj al Persio, resetligante la popolon en irana profundo. Kiel konsekvenco, la erevana loĝantaro fariĝis 80% islamana kaj 20% kristan-armenoj.

La 7-an de junio 1679 terura tertremo detruis la Erevanan fortikaĵon, la urbo estis ruinigita.

En 1724 la heroa defendo de Erevano daŭris 2 monatojn, kaj nur kiam al la turkoj venis helpi la 40 mil armeanoj, la urbo estis detruita.

Post 1747 la urbo estis parto de la Ĥanato de Erevano, islamana princlando sub persa regado.

Dum la dua rus-persa milito Erevano estis liberigita fare de la rusaj trupoj sub gvidado de Ivano Paskeviĉ la 1-an de oktobro 1827, kaj formale cedata de la persoj en 1828.

Fine de la 1920-aj jaroj Erevano iĝis la ĉefurbo de la Armenia SSR. Ekde tiam okazis multaj eventoj, la jarcentoj ŝanĝiĝis, sed neniu povus detrui Erevanon kaj malhelpi la vivojn de ĝiaj loĝantoj. Ekde tiam la urbon oni nur rekonstruas.

En 1924 elstara arkitekto Aleksandro Tamanjan kreis genian planon por la disvolviĝo de Erevano. Dum la jaroj la armena ĉefurbo transiris al la dekstra bordo de la rivero Hrazdan, grimpis la Kanaker-altebenaĵon, en la dezertaj teritorioj kreskis Nork, Achapnyak, Zeytun, Avan ... El belega vulkana ŝtono – tufo estis konstruitaj belegaj domoj, starigitaj multaj monumentoj al eminentaj homoj, fluas fontanoj kaj multegaj fontanetoj de kristalpura, el montoj venanta trinkebla akvo.

Sed la urbo estas ankaŭ ĉiuj homoj, kiuj protektas sian historion, ĉar ĉi tiu historio estas neeviteble ligita kun sia persona historio. Erevan ne nur estas la ĉefurbo de Armenio, ĝi estas la ĉefurbo de ĉiuj armenoj, kien ajn ili loĝas. Por nacio dividita en diasporojn estas necese havi unuigan hejmon. Armenoj de la tuta mondo venas al Erevano, kiel riveretoj al sia maro.

De ĝi komenciĝas la historia Patrujo por la posteuloj de armenoj, kiuj fuĝis de la Genocido kaj disiĝis ĉirkaŭ la mondo.



Erevano estas rozkolora urbo en smeralda kadro, simbolo de la hejma fajrujo kaj la historio, kiu ligis nin ĉiam de Erebuno kaj konservis por generacioj ĉi tiun grandan heredaĵon – la urbon.

Kelkaj aliaj vidindaĵoj

Amberd Ամբերդ

Amberd estas mezepoka fortikaĵo en la historia regiono Aragatsotn. Ĝi troviĝas sur la sudaj deklivoj de la monto Aragats, sur la alteco je 2300 metroj. Ĝin ekkonstruis en la 7-a jarcento de nobela Domo kamsarakanoj. Kvar jarcentojn poste la fortikaĵo kaj ĉirkaŭaĵoj estis aĉetitaj de la Domo de Pahlavuni kaj rekonstruitaj de Princo Vahram Vaĉutjan Pahlavuni, kiu en 1026 konstruis ankaŭ la preĝejon de sankta Dipatrino kaj fortigis la komplekson pere de dikaj ŝtonaj muroj. La fortikaĵo estis parto de la defenda sistemo de la mezepoka Armenio, kiu kontrolis la plataĵon de la monto Aragats. Inter la 10–11-aj jarcentoj en la suda parto de la fortikaĵo estis konstruita banejo. Ĝia ĝemelbanĉambroj ankoraŭ estas modere sendifektitaj. Ĝi estas unu el la raraj atestaĵoj de la militista arkitekturo de la mezepoka Armenio. En la 11-a jarcento selĝuk-turkoj invadis la fortikaĵon kaj poste en la jaro 1236 mongoloj (Tamerlan) atakis, kaptis la fortikaĵon kaj detruis.

Monaĥejo Aĥthala Ախթալայի վանք

La monaĥejo Aĥthala estas ĉirkaŭbarita monaĥejo de la 10-a jarcento. La fortikaĵo ludis gravan rolon en la protektado de la nordokcidenta Armenio, regiono Gugarkh. La konstruaĵo estas bonkonservita kaj la ĉefa preĝejo famas pro la freskoj kaj la altkvalite dekoritaj pentraĵoj, kiuj kovras la murojn.

Monaĥejo Ĥor Virap Խոր վիրապի վանք

Ĥor Virap signifas Profunda Kavoj. Ĝi estas fortikaĵo-monaĥejo de la 17-a jarcento, kiu troviĝas en la regiono Ararat, ne malproksime de Erevan. Laŭ la legendo ĉi tie troviĝis la ĉefurbo de la antikva Armenio Artasat. Ĥor Virap estas la unua sankta loko de la kristana Armenio. Sur la loko de nuna preĝejo estis prizono. Ĉi tie estis kavoj kun svarmintaj serpentoj kaj venenaj insektoj, kien oni ĵetis malliberulojn. En la tria jarcento la pagana reĝo Trdat (Tiridates) la 3-a de Armenio persekutis kaj eĉ mortigis la kristanojn. Grigor Lusavoriĉ, la estonta sankta Grigor la Iluminanto, pro prediko de kristanismo sentemplime estis forĵetita en unu el tiuj kavoj. Li mirakle postvivis dum 13 jaroj dank' al la ĝentileco kaj nutrigado de malriĉa kristana virino, kiu ĉiutage alportis akvon kaj panon al li. La reĝo, post martirigo de Gajane, Hripsime kaj iliaj samreligianoj, danĝere malsaniĝis. Al reĝo soniĝis vizio sciigante, ke lin povus savi nur Grigor. Laŭ la ordono de la reĝo Trdat Grigor estis liberigita kaj kondukita al Vagharŝapat (nun Eĉmiadzin). Post absolvado de la malliberulo, antaŭdiro realiĝis kaj la reĝo resaniĝis, Grigor eĉ konvertis lin al kristanismo kaj poste la reĝo baptiĝis, kion sekvis la tuta popolo. Grigor la Iluminanto fariĝis fondinto de la unua armena kristana preĝejo (monaĥejo Amaras en Montara Karabaĥo). Kiam la reĝo Trdat akceptis kristanismon (en la jaro 301), Armenio fariĝis la unua kristana lando en la mondo. En la jaro 642 sur la kavoj-malliberejo de Grigor la Iluminanto la katolikoso Nerses la 3-a konstruis preĝejon de sankta Grigor la Iluminanto kaj hodiaŭa preĝejo estis konstruita sur tiu ĉi preĝejo. Sube de preĝejo troviĝas la sama kavoj-malliberejo, kiu havas 6 metrojn da profundeco kaj 4,4 metrojn da diametro.

Zorac Kharer Չորաց Զարեր

Zorac Kharer, ankaŭ konata kiel Kharahunĝ-observatorio aŭ la armena Stonehenge, estas la prahistoria arkeologia ejo, kiu troviĝas en la regiono Sjunik, proksime de urbo Sisian. Khar aŭ qar signifas ŝtono. La monumento Kharahunĝ konsistas proksimume el 223 ŝtonoj t.e. megalitoj. Proksimume 50 ŝtonoj havas cirklan truon, kiu precize konformiĝas al dispozicioj de steloj estintaj sur la ĉielo dum tiama epoko. Monumento Kharahunĝ havas la saman orientiĝon kiel Stonehenge en Britio kaj estas

unika, ĉar ĝi estas tre bone konservita, la ŝtonoj neniam estis movitaj, konservante la tutajn arkeologiajn informojn. Por studado de Zorac Kharer estis organizitaj pluraj ekspedicioj de diversaj arkeoastronomistoj (ekspedicioj de universitatoj de Munkeno, Oksfordo...) dum pluraj jardekoj. Tamen la plej ampleksa esplorado estis farita en la 1980-aj jaroj fare de armena astronomo -akademiano Paris Heruni kaj Elma Parsamjan (Observatorio Bjurakan, Armenio). Laŭ Heruni la ejo estis „pagana templo kun granda kaj evoluinta observatorio, kaj ankaŭ universitato”. Li opinias, ke la templo estis dediĉita al la armena dio de suno Ari kaj havas 7500-jaran historion.

Monaĥejo Tathev Տաթևի վանք

Monaĥejo Tathev troviĝas en la distrikto Goris de regiono Sjunik (antaŭe provinco Zangezur), je 316 km de Erevan, sudoriente de Armenio. Ĝi estas la fama arkitektura monumento de la mezepoka Armenio kaj estis fondita en la 9-a jarcento sur la fundamento de la antikva sanktejo kaj konstruadis ĝis la 18-a jarcento, tamen plimulto de ĝiaj konstruaĵoj estis konstruita en la 13-a jarcento. Monaĥejo Tathev estis religia, kultura kaj politika centro de la sjunika princlando de Granda aŭ Majora Hajk. Ĉe la monaĥejo funkciis Arkimandritejo de Sjunik, la plej fama instruadscienca edukejo de la mezepoka Armenio. Kiel universitato ĝi estis menciita en la jaro 1390 kaj funkciis ĝis la jaro 1435. En oktobro 2010 en Armenio okazis malfermo de la plej longa kablotramo de la mondo – 5700 m, kablotramo de la monaĥejo Tathev.

Lago Sevan Սևանա լիճ

Sevan estas la plej granda lago en Armenio kaj unu el la plej grandaj altaj lagoj en la mondo. La tuta lago situas en la orienta armena provinco Gegharkunik. Ĝi estas nutrata de 28 riveroj kaj torentoj. Nur 10% de la enfluinta akvo iras al rivero Hrazdan, dum la ceteraj 90% forvaporigās. Kun lagoj Van kaj Urmia Sevan estis unu el la tri grandaj lagoj de la historia Armena Regno, kolektive nomataj la Maroj de Armenio, kaj ĝi estas la sola en la limoj de la nuna Respubliko Armenio. Sevanavank estas la historia areo ĉe la lago.

Antaŭ ol homa interveno ege ŝanĝis tiun ĉi ekosistemon, la lago estis 95 metrojn profunda, kovris areon de 1360 km² (5 % de la tuta areo de Armenio), havis volumenon de 58 km³ kaj perimetron de 260 km. La laga surfaco estis je alto de 1950 m super marnivelo.

Matenadarano Մատենադարան

Matenadarano (= biblioteko) aŭ Instituto Maŝtoc por la esplorado ĉe la antikvaj manskribaĵoj estas unu el la plej riĉenhavaj bibliotekoj pri

manskribaĵoj kaj dokumentoj el la tuta mondo. La biblioteko troviĝas en Erevano, ĉefurbo de Armenio, ĝi havas pli ol 17 000 antikvajn manskribaĵojn kaj ĉ. 300 000 arkivdokumentojn. La historio de tiu biblioteko komenciĝas en la 5-a jarcento p. K. kaj laŭ la tradicio, la kreinto estis Mesrop Maŝtoc mem, inventinto de la armena alfabeto en 405. La biblioteko estas publika proprietaĵo listigita en la listo Memoro de la Mondo de Unesko, la Instituto estas unu el la esencaj kaj plej gravaj bibliotekoj de Armenio, kiu okupiĝas pri la kolektado kaj konservado de la nacia armena memoro.

Ni Estas Niaj Montaroj Մենք ենք մեր սարերը



„Ni Estas Niaj Montaroj“ estas monumento troviĝanta en Stepanakerto, ĉefurbo de Arcaĥo (Montara Karabaĥo).

La skulptaĵo, finita en 1967 de Sargis Baghdasarjan, estis adoptata kaj agnoskata kiel la simbolo de Montara Karabaĥo. Ĝi estis farita el tofo, kaj desegnas vizaĝojn de viro kaj ino el fruaj epokoj, reprezentante la

montaran popolon de tiu ĉi antikva regiono.

Ĝi ankaŭ estas konata kiel „Avĉjo kaj Avnjo“. La skulptaĵo ankaŭ aperas en la blazono de Arcaĥo.

laŭ <https://aresun.weebly.com/> kaj Vikipedio

Armena gastronomio

Armenio havas siaspecan kuirarton. Bazo de armena delikataĵo estas freŝaj ingrediencoj. Jen kelkaj delikataĵoj: *dolma*, *ĥaŝlama*, *ĥorovats* (ŝaŝliko). Bazo de dolma estas muelita viando, rizo kaj spicoj envolvitaj per vitfolioj (oni kuiras kaj manĝas kun saŭco, kio konsistas el jahurto, acidkremo kaj ajlo) aŭ farita en someraj legomoj.

Ĥaŝlama estas kuirita ŝafaĵo kun spicoj kaj estas ege bongusta. Viziti Armenion sen gustumi ĥorovats viaj impresoj pri armenaj kuiradoj estos malplenaj. Tio estas sukriĉaj pecoj de freŝa bovaĵo aŭ ŝafido, porko, fiŝo, kokido antaŭe marinata kun spicoj kaj rostita kun melongeno, tomato, freŝa pipro super lignofajro. *Bonan apetiton!*

Nenio estas simila al aromo de freŝbakita armena pano „lavaŝ“ – maldika platpano, kiun oni preparas en speciala subtera argila forno nomita „tonir“. Preparado de lavaŝ estas malnova tradicio kaj observado de tiu procedo estas reala amuzo.

laŭ <https://aresun.weebly.com/>

Noa sur la montoj Ararat

Gn 8 Kaj Dio rememoris Noan, kaj ĉiujn bestojn kaj ĉiujn brutojn, kiuj estis kun li en la arkeo; kaj Dio venigis venton sur la teron, kaj la akvo kvietiĝis. 2 Kaj fermiĝis la fontoj de la abismo kaj la aperturoj de la ĉielo, kaj ĉesiĝis la pluvo el la ĉielo. 3 Kaj iom post iom reforiĝis la akvo de sur la tero, kaj la akvo komencis malmultiĝi post la paso de cent kvindek tagoj. 4 **Kaj la arkeo haltis en la sepa monato, en la dek-sepa tago de la monato, sur la montoj Ararat.** 5 Kaj la akvo konstante malpliĝadis ĝis la deka monato; en la unua tago de la deka monato montriĝis la suproj de la montoj. 6 Kaj post kvardek tagoj Noa malfermis la fenestron de la arkeo, kiun li faris. 7 Kaj li ellasis korvon, kaj ĝi elflugis, forflugadis kaj revenadis, ĝis forsekiĝis la akvo sur la tero. 8 Kaj li ellasis de si kolombon, por vidi, ĉu jam malfortiĝis la akvo sur la tero. 9 Sed la kolombo ne trovis ripozejon por siaj piedoj, kaj ĝi revenis al li en la arkeon, ĉar akvo estis sur la supraĵo de la tuta tero. Kaj li etendis sian manon kaj prenis la kolombon kaj envenigis ĝin al si en la arkeon. 10 Kaj li atendis ankoraŭ aliajn sep tagojn, kaj li denove ellasis la kolombon el la arkeo. 11 Kaj revenis al li la kolombo en tempo vespera, kaj jen ĝi havis en sia buŝo deŝiritan folion de olivarbo; kaj Noa konvinkiĝis, ke la akvo malfortiĝis sur la tero. 12 Kaj li atendis ankoraŭ aliajn sep tagojn, kaj li ellasis la kolombon, kaj ĉi tiu jam ne plu revenis al li. 13 Kaj en la sescent-unua jaro, en la unua tago de la unua monato, forsekiĝis la akvo sur la tero; kaj Noa malfermis la tegmenton de la arkeo, kaj li vidis, ke sekiĝis la supraĵo de la tero. 14 Kaj en la dua monato, en la dudek-sepa tago de la monato, la tero elsekiĝis.



El la Sankta Biblio, Genezo, ĉapitro 8 (1–14)

Ŝtataj simboloj de Armenio



La **ŝtata blazono** de Armenio akceptita en la jaro 1991 anstataŭis tiun de la soveta periodo. Ĝi similas al la uzata dum la unua sendependiĝo (Armena Demokratia Respubliko), el la projekto de la arkitekto Aleksandro Tamanjan kaj la pentristo Hagop Goĉojan.

En la centro de la ŝildo troviĝas ilustraĵo de la monto Ararato kun la arkeo de Noa surpinte. En la kvaronoj de la ŝildo troviĝas la simboloj de la kvar historiaj armenaj dinastioj: Bagratidoj

(Pakraduni), en la unua kvarono; Artaksidoj (Ardaŝesjan), en la dua; Arsakidoj (Arŝakuni), en la tria kaj en la kvara la Rubenida Dinastio (Rupenian).

La ŝildo estas kovrata maldekstre de aglo kaj leono dekstre. Sub ili la plumo reprezentas la kleriĝon, la tritikospiko la fruktodonan laboron kaj la rompitaĵoj la liberecon kaj sendependiĝon. La ŝildo estas tenata de aglo el arĝento (blanka) kaj leono el oro, simboloj de antaŭaj gloraj dinastioj.

La **flago** de Armenio, adoptita en la jaro 1990, konsistas el tri horizontalaj samlarĝaj strioj, ruĝa la supra, blua la centra kaj oranĝa la malsupra. Ĝi estis uzata unuafoje dum la efemera ekzistado de la Armena Dem. Respubliko en 1918.



La signifo de la koloroj estis multfoje interpretitaj. Tamen, multaj interkonsentas, ke la ruĝo reprezentas kaj honorigas la sangon elverŝitan de la armenaj soldatoj en la militoj, la bluo reprezentas la armenan ĉielon kaj la abrikotkoloro simbolas la fruktodonajn grundojn de Armenio kaj la terkultivistojn.

La oficiala signifo de la koloroj, kiel diras la Konstitucio de la Armena Respubliko, estas: „La ruĝo estas simbolo de la armena montaro, la daŭra batalo de la armena popolo por la vivtenado, la konservado de la kristana kredo, la sendependeco kaj libereco de Armenio. La bluo estas simbolo de la volo de la armena popolo vivi sub paca ĉielo. La abrikotkoloro estas simbolo de la kreiva talento kaj la laboremo de Armenio.“

laŭ Vikipedio

Armena alfabeto Հայերենի այբուբեն

La armena alfabeto estas uzata por skribi la armenan lingvon ekde la jaro 405 aŭ 406 p. K. Ĝi estis kreita de sankta Mesrop Maŝtoc – monaĥo, teologo kaj lingvisto – por traduki la Biblion.

Ա ա a	Բ բ b	Գ գ g	Դ դ d	Ե ե je, e <i>[je] ĉe la komenco de vortoj, [e] ene</i>	Զ զ z	Է է e
Ը ը [ə] <i>kiel franca e en vortoj le, je, te</i>	Թ թ t ^h <i>kiel t en anglaj vortoj table, town</i>	Ժ ժ ĵ	Ի ի i	Լ լ l	Խ խ ĥ	Ծ ծ t ^s <i>kiel la unua տ en rusaj vortoj мѣрадь, мѣхо</i>
Կ կ k	Հ հ h	Ձ ձ dz	Ղ ղ gh	Ճ ճ <i>mola ĉ</i>	Մ մ m	Յ յ j
Ն ն n	Շ շ ŝ	Ո ո vo, o <i>[vo] ĉe la komenco de vortoj, [o] ene</i>	Չ չ ĉ	Պ պ p	Ջ ճ ĝ	Ռ ռ <i>malmola r</i>
Ս ս s	Վ վ v	Տ տ t	Ր ր <i>mola r</i>	Յ չ c	Ի լ u	Փ փ p ^f <i>kiel p en la angla, ekz. pig, pumpkin</i>
Ք ք k ^h <i>kiel c en anglaj vortoj cat, cake, because</i>	Օ օ o	Ֆ ֆ f				

Diftongon **ԵՎ**, kiu en minuskloj havas specialan signon **և** (anstataŭ եվ), oni legas [jev] kiam ĝi memstaras kaj [ev] en vortoj.

Diftongon **ՈԻ ու** oni legas kiel u (= same kiel la literon Ի).

ԷՍՊԵՐԱՆՏՈ = ESPERANTO

Էսպերանտո = Esperanto

Spuroj de Armenio en Prago




En la centro de Prago en la strato Jindřišská (kvartalo Nova Urbo) staras ekde la jaro 2014 ĥaĉkaro kiel monumento de la armenaĉeĥa amikeco. Ĝi estis donaco de la Armena Apostola Eklezio.

Nur kelkaj paŝoj de tie en Havlíčkova strato troviĝas la naskiĝdomo de la fama verkisto Franz Werfel

(1890–1945), aŭtoro de la romano *La Kvardek Tagoj de Musa Dagh*, temanta pri la armena genocido.

En Prago ni havas du stratojn rilatajn al Armenio. Ambaŭ troviĝas en la kvartalo Vršovice. Unu nomiĝas Arménská (Armenia strato) kaj la alia Jerevanská (Erevana strato).



La Armena Apostola Eklezio uzas la preĝejon de Sankta Spirito en la praga Malnova Urbo.

Praganoj povas gustumi armenajn kuirajojn en kelkaj armenaj restoracioj – inter aliaj Old Armenia en la kvartalo Libeň aŭ Pomegranate Armenian Restaurant en la kvartalo Nova Urbo.

La armena komunumo en Prago nombras kelkaj centojn (eble preskaŭ unu milon) da homoj. Ili eldonas revuon Orer (<http://orer.eu>).

La Fabelo de la lasta Penso

Edgar Hilsenrath

Kaj Meddah demandis:

– Sed kial ĵus vi ridis, Tovma Ĥatisjan?

– Ĥar antaŭ unu sekundo mi parolis kun turka ĉefministro.

– Ĥu li ion diris?

– Jes.

– Finfine mi kaptis lin – turkan ĉefministron. Lia voĉo sonis minace en telefono. Li simple demandis:

– Kiu kuraĝas telefoni ĉi tien?!

Kaj mi, sidinte ĉe la sendanĝera fino de telefondrato, diris:

– Mi kuraĝas.

– Sed kiu vi estas?

– Mi estas via armena psikiatro.

– Kaj kion vi volas de mi?

– Tute nenion.

– Tio signifas, ĉu mi ion volas de vi?

– Ĥuste tiel!

– Do, morgaŭ mi venos vian akceptejon.

– Estu trankvila.

Mi donis al li mian adreson. Li venis ĝustatempe.

– Mi songas koŝmarajn songojn, – diris li.

– Ĥiuj turkoj songas koŝmarajn songojn, – diris mi.

– Sed kial?

– Pro armenoj.

– Do, ĉu pro armenoj?

– Jes.

– Sed kio okazis kun armenoj?

– Ilin ekstermis turkoj.

– Tie mi havas nenian aferon. Kaj neniu havas ian aferon. Kaj neniu hodiaŭa turko.

– Tion mi ankaŭ ne insistas.

– Vere tio okazis tre delonge. En la jaro 1915. Dum la unua mondmilito. Neniigis tuta popolo.

– Ĥu simple neniigis?

– Simple neniigis.

– Jam mi aŭdis ion pri tio, – diris turka ĉefministro, – sed mi ĉiam opiniis, ke tiuj estas elpensitaj mensogaj fabeloj de niaj malamikoj.

– Tio ne estas fabelo.

– Ĥu estas genocido?

– Ĥuste tiel.

- Ĉu paroksismo de spontana furiozo de turkpopolo?
- Ne.
- Do, ĉu tio ne supreniĝis de malsupro?
- Tio venis de supro. Ĉio okazis laŭ ordono de tiama turka registaro. Ĉio estis absolute organizita. Kaj rilatas al la tiama programita unua genocido de la 20-a jarcento.
- Mi pensis, ke tion inventis germanoj.
- Tion ne ili inventis.
- Sekve ĉu ni – turkoj, estis iliaj instruintaj majstroj?
- Estas tiel.
- Sed pri tio nenio estas en niaj historiaj libroj, – diris turka ĉefministro.
- Mi scias, – diris mi.
- Ĉu pro preterlasoj?
- Pro historiaj preterlasoj, – diris mi.
- Kaj ĉu tio estas la kaŭzo, ke mi travivas tiajn terurojn? – diris turka ĉefministro.– Mi songas koŝmarojn nur pri tiaj preterlasoj kaj incidentoj.
- Sidiĝu, – diris mi.
- Sed, kie?
- Ie en mia akceptejo.
- Sed tio ne estas akceptejo, tio estas libro de turka historio.
- Tio ne havas signifon.
- Ĉu vere, mi devos sidiĝi?
- Jes.
- Ĉu aŭ mi kuŝu?
- Kiel vi volas.
- Pli bone estos, se vi sidiĝos sur seĝeto.
- Sed mi nenie vidas seĝeton.
- Do, vi sidiĝu sur mia kanapo. Vi ankaŭ povas kuŝi.
- Sed mi ne vidas kanapon.
- Sekve, vi sidiĝu, mi pensas, sur planko.
- Turka ĉefministro kapjesis. Li nur diris:
- Sed mi plankon ankaŭ ne vidas.
- Kaj poste li ekkriis.
- Neniu povas aŭdi vin, Tovma Ĥatisjan, – diris la fabelisto, – ĉar via parolo estas muta. Sed mi aŭskultis vin.
- Ĉu ankaŭ vi aŭdis krion lian – de turka ĉefministro? kiam li ruliĝis en plankan malplenon.
- Tion ankaŭ mi aŭdis.
- Mi refoje renkontis turkan ĉefministron, – diris mi al fabelisto.
- Kiam?
- Antaŭ kelkaj sekundoj.
- Kaj kie?

– En la granda kunsida halo de Unueco de Konscienco de nacioj. Tio estis dum jam kutimfarita kongreso.

Li sidis apud la reprezentanto de registaro, sole kaj senrigardeble. Kiel poste mi eksciis, li plu ne estis ĉefministro, sed arkivestro de Unueco de Konscienco de nacioj. Tuj vidinte min, li ekstaris kaj malsupreniris al arkivo. Mi sekvis lin.

– Mi serĉas armenajn ratifikaĵojn, – diris mi. – Temas pri forgesita raporto de genocido.

– Ĉu pri forgesita genocido?

– Jes.

– Kaj kiam tio estis farita?

– En la jaro 1915.

– Jam multe da tempo trapasis. Nun estas la jaro 1988.

– Jes, – diris mi.

– Ja vi vidis, – diris li!

Poste li min alkondukis al ŝranko de ratifikaĵoj. Kaj diris:

– Nia ŝranko de ratifikaĵoj ne havas pordon. Tiuj estas malfermitaj librobretoj, atingeblaj por ĉiuj, ĉar ĉi tie ni ne havas ian sekreton.

– Do, montru al mi, kie mi povos trovi armenan ratifikaĵon?

– Bedaŭrinde, vi ne sukcesos, – diris li, – ĉar tiel malnova ratifikaĵo, kiel estas armena ratifikaĵo, jam delonge estas polvokovrita, kaj tiel polvokovrita, ke iĝis netrovebla.

– Do, alvoku vi purigistinojn kaj ordonu purigi tion de polvo.

– Mi antaŭlonge faris tion, – diris arkivestro, sed tio ne estas simpla afero.

– Kial?

– Ĉar ĉiuj purigistinoj de Unueco de Konscienco de nacioj estas astmulinoj kaj ne volas purigi malnovajn ratifikaĵojn de polvo, precipe tian malnovan, kia estas forgesita ratifikaĵo de genocido. Tio devenigos polvoŝtormon kaj stimulos tuson.

Mi diris:

– Mi povos kompreni.

– La forgesecon oni ne devas senpolvigi, – diris arkivestro. – Tio estas tre danĝera.

Kaj post tiu frazo li malaperis.

Poste mi supreniris grandan halon de kunsidoj. Sidante en socio, mi multfoje indignis, volante interrompi turkan oratoron, sed servistoj pri disciplino forigis min el halo.

Unufoje mi sukcesis ree penetri halon. Mi staris apud ĉefsekretario kaj faris flaman paroladon. Mi rakontis pri mia popolo, kiun turkoj neniigis kaj ĉiuj reprezentantoj de nacioj iom da tempo aŭskultis min. Sed baldaŭ ili komencis enui, kaj unu post la alia forlasis halon. En fino mi restis absolute sole.

Tiutempe envenis purigistino. Ŝi ĝuste estis astmulino, kiu tusante diris al mi:

– Kion vi faris ĉi tie?

– Mi atendis vin.

– Ĉu min?

– Jes, vin.

– Ĉu vi estas unu el diplomatoj, kiuj flirtas kun purigistinoj?

– Ne.

– Do, kion vi volas de mi?

Mi diris:

– Mi volas, ke vi senpolvu memoron.

Ŝi nur ridis.

Dum purigistino per broso purigis plankon, mi rakontis al ŝi mian historion, ĉar mi pensis, ke purigistinoj estas babilemaj, kaj mian historion ili rakontos en la fojeroj kaj koridoroj de Unueco de Konscienco de nacioj, kaj tiel ĉiuj reprezentantoj de nacioj scios pri tio, sed purigistino tute ne aŭskultis min. Purigante plankon, ŝi daŭre montris al mi sian postaĵon kaj poste foriris el granda halo de kunsidoj.

Nun mi ree estis sole. Iomete hezitinte, mi vagabondis preter la tabloj de apartaj nacioj, legis nacitabulojn kaj finfine haltis antaŭ loko de la ĉefsekretario. Mi trapaŝis malantaŭon de katedro kaj sin turnis al malplena halo.

Mi rakontis al silento genocidan historion. Mi centrigis la atenton de silento al tio, ke kiel grave estas, kiam malkaŝe paroliĝas pri tio:

ĉiu devas scii tion. Do, kiel en estonto oni devos bari genocidon, kiam ĉiu insistas, ke ili nenion sciis kaj nenion baris, ĉar ion similan ili eĉ ne povis imagi. Mi parolis longe kaj cirkonstace. Mi ne celis ion por mia popolo, postulis nenian punon por persekutantoj. Mi diris:

– Mi nur volas fiaskigi silenton.

Nur pli malfrue mi komencis paroli pri mi. Mi rakontis por malplena halo la historion pri mi kaj mia familio. Mi parolis pri mia patro kaj patrino, avo-avino, pri antaŭavoj, pri onklo-onkloj. Mi parolis pri tiuj, kiujn mi neniam konis, parolis dum tiom da tempo, ĝis mi konsumite haltis, malfermis miajn okulojn kaj apogis mian kapon sur miaj manoj. Kiam mi malfermis miajn okulojn, ĉe mi staris la ĉefsekretario. Li diris:

– Vi ne vidis min, sed mi tuttempe staris ĉe vi.

– Tiele, ĉu vi ĉion aŭskultis?

– Mi ĉion aŭskultis.

– Ĉu vi rakontos por aliaj homoj?

– Ne, – respondis la ĉefsekretario. – Mi tion por aliaj homoj ne rakontos.

Poste ni kune fumis cigaredon. La ĉefsekretario diris:

- La historio de via familio ŝajnis precipe intermiksita kaj mi pensas: kiel vi vivis antaŭ Granda Masakro kaj poste kiel vi ekstermiĝis.
- Mi kapjesis kaj nenion diris.
- Sed estas strange, – diris la ĉefsekretario, – ke vi, sinjoro Hatisjan, tiel detale memoras ĉion. Se mi ne eraras, vi neniun konis de via familio, eĉ vian propran patrinon. Ĉar kiam vi naskiĝis, sinjoro Hatisjan, en 1915, ili ĉiuj aŭ estis mortintaj, aŭ senspure malaperitaj.
- Mia patrino estis kun mi.
- De kie vi scias tion?
- Mi ne scias tion, sinjoro ĉefsekretario, tamen mi tre ĝuste scias tion.
- Ĵus nun vi rakontis al malplena halo, ke tiam du turkoj trovis vin sur vojo.
- Jes, sinjoro ĉefsekretario. Viro kaj virino.
- Kaj poste, vi tiel rakontis, ili fordonis vin al orfejo: multaj similaj estis en tiu tempo.
- Jes.
- Post Granda milito baldaŭ venis du sinjorinoj de „Ruĝa kruco” kaj portis vin Svislandon. Tion ankaŭ vi ĵus rakontis.
- Ĝuste, sinjoro ĉefsekretario.
- Tie vi restis, kaj hodiaŭ vi estas civitano de Svislando.
- Jes.
- Do, vi estas svislandano.
- Ne, sinjoro ĉefsekretario, mi estas armeno. Armeno kun svislanda pasporto.
- Sed via familio, sinjoro Hatisjan... Vi neniam konis vian familion. Kaj neniun konis vi. Eĉ vi ne scias familinomon de via familio.
- Estas ĝuste.
- Iutage vi prenis familinomon Hatisjan, ĉar vi opiniis, ke iel devis esti nomigita via familio.
- Jes, sinjoro ĉefsekretario. La familinomo Hatisjan estas ofte renkontanta armena familinomo.
- La ĉefsekretario ridetis. Li diris:
- Vi eĉ ne scias, de kie devenas via familio, nek nomon de via urbo aŭ vilaĝo. Vi nenion scias pri tio. Nenion!
- Vidu, sinjoro ĉefsekretario, – diris mi, – kiam mi estis 13-jara, mi komencis mian esploradon. Kaj dum 60 jaroj daŭre faris nenion, krom la esplorado.
- Kaj ĉu vi trovis ian spuron?
- Mi trovis multajn spurojn, sed ĉiuj tiuj kondukis al necerteco.
- Do, ĉio estas ĝuste. Vi ne scias, kiu vi estas.
- Ne, – diris mi. – Mi scias, kiu estas mi.

Dum sesdek jaroj mi senĉese petadis rakonti savitulojn de masakro rakontaĵojn pri Armenio, kiu ankaŭ nomiĝas Turkarmenio aŭ Anatolio, kiel vi volas, kaj poste el multegaj rakontaĵoj, kiel decas, mi kreis mian propran rakonton. Kaj tiel mi iutage havis ĝustan familian historion. Mi konis miajn radikojn. Denove mi havis patron, patrino, ankaŭ multegajn geparencojn. Mi havis ankaŭ tradician familinomon, kiun mi povis multigi pere de miaj gefiloj kaj genepoj. Sed, sinjoro ĉefsekretario, ĉi tiu rakonto iomete estas intermiksita en mia kapo. Sed, baldaŭ ĝi havos sian formon, estos tiom ĝuste, kiom estas ĉiuj ĝustaj rakontoj.

– Kaj kiam tio estos?

– Ege baldaŭ.

– La lasta klareco ĉiam venas malfrue, – diris la ĉefsekretario kaj preskaŭ ŝerce tuj aldonis. – Ĝi ofte venas kun Lasta Penso.

– Tamen tio ne estas ekstreme malfrue – diris mi. Poste daŭrigis, – kun Lasta Penso ĉio klariĝas. Kaj mi jam vidas: La Lasta Penso ordonos ĥaoson en mia kapo. Kaj la konfirmita ordo en mia kapo tenere lulante forportos min el vivo. Oni diras pri mi: „Rigardu, tiu homo mortis kiel arbo. La arbo povas perdi foliojn, sed neniam siajn radikojn. Kaj kial ĉe homoj devos esti alimaniere?”.

Kaj ree mi kuŝas sur mia mortlito. Kaj en mia kapo Meddah diras:

– Vi estas perfekta atendanto, Tovma Ĥatisjan. Vi atendas vian Lastan Penson, kiel fianĉino atendas sian fianĉon, kiu venas al ŝi montri siajn proprajn radikojn. Kaj mi avertas vin, Tovma Ĥatisjan, la Lasta Penso estas tre mallongtempa.

– Ĉu ne eblas longigi tiun tempon?

– Ne, Tovma Ĥatisjan.

Kaj Meddah diris:

– Tamen mi jam povas rakonti pri via Lasta Penso, kiu sidas en via terurkrio kaj plenita kun atendo devos flugi al via patro, patrino kaj ĉiuj aliaj geparencoj, kiujn vi neniam konis. Mi ankaŭ jam povas informi vin pri sekreto, ke via Lasta terurkrio reŝanĝiĝos al alio.

– Kion vi konsideras?

– Tion, ke ĝi reŝanĝiĝos al ĝoja atendkrio.

– Sekve, ĉu mi mortos sen teruro?

– Vi ne mortos en sendifineco.

– Ĉu?

– Jes!

Kaj mi diris al Meddah en mia kapo:

– Rakontu al mi pri mia Lasta Penso, por ke vi plenigu la momenton de atendado kaj longigu tion, kio estas pli mallonga ol sekundo kaj devas bruli en mia kapo. Ja vi promesis al mi tion.

– Mi nur unu fabelon promesis al vi.

– Ĉu fabelon de la Lasta Penso?

– La fabelon de la Lasta Penso.

Kaj Meddah diris:

– Unufoje mi ĉirkaŭprenis vian praavon. Tio estis sur bazarplaco de turka granda urbo Bekiro. Mi turklingve rakontis por li fabelon kaj diris: bir vermiŝ, bir jokmuŝ, bir vermiŝ... Estas, ne estas, estas... Ĝuste tiel komenciĝas ĉiuj fabeloj en tiu lando kaj kial devos alimaniere komenciĝi tiu fabelo, kiun mi rakontos por vi?

Do, aŭskultu min, Tovma Ĥatisjan. Mi diras al vi: bir vermiŝ, bir jokmuŝ, bir vermiŝ... Estas, ne estas, estas...

*Fragmento de la romano La Fabelo de la lasta Penso
Esperantigis Susanna Gevorgyan kaj Erjanik Gevorgyan*

El versoj de Jeghiŝe Ĉarenc

En mia dolĉa Armenio,
Sungustan vorton amas mi,
De saz' malnova kaj plorema,
Malĝojan kordon amas mi,
Aromon de la rozoj freŝaj,
De sangsimilaj floroj belaj
De Nairi land' belulinoj
Lertegan dancon amas mi ! ...



*Vizitu interesajn retpaĝojn de Armenia Esperantista Unuiĝo
[https://aresun.weebly.com/!](https://aresun.weebly.com/)*

Tostu torton Marlenka kaj brandon Ararat.

Prosíme, nezapomeňte zaplatit **klubové členské příspěvky na rok 2021**. Výše ročního příspěvku činí 100 Kč; pro studenty a seniory 80 Kč. Můžete zaplatit osobně při našich schůzkách nebo bankovním převodem na bankovní účet č. 2801096435/2010. Při bankovním převodu uveďte raději svoje jméno. Kontakt: Jiří Mišurec, misuj@email.cz.

Termíny schůzek klubu leden – červen 2021

leden: 7. 1., 21. 1. / únor: 4. 2., 18. 2. / březen: 4. 3., 18. 3.

duben: 1. 4., 15. 4., 29. 4. / květen: 13. 5., 27. 5. / červen: 10. 6., 24. 6.



B U L T E N O
de Esperantista Klubo en Prago
Časopis Klubu esperantistů v Praze
Redaktor: Tomáš Břicháček

Vydavatel:

Klub esperantistů v Praze

pobočný spolek Českého esperantského svazu, z. s.

IČO 66004322

C/o Jiří Mišurec

Jirečkova 5

170 00 Praha 7